



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2026 (236)

15. 4. 2026

Petr Chrdle festis sian jubileon inter geamikoj kaj libroj



Foto: Esperanto.cz

La mondfama esperantisto Petr Chrdle, en la antaŭvespero de sia 80-a naskiĝtago, solene prezentis du novajn librojn de sia eldonejo. Poste sekvis tostoj kaj tortoj. La etoso estis brila kaj kortuŝa. Ni ĉeestis tion.

(Legu pli sur la paĝo 6.)

EL LA ENHAVO

Viktor Dvořák 90-jaraĝa	3
Petr Chrdle 80-jaraĝa	5
Solena vespero de KAVA-PECH	6
E-Laboro en ĈSR en la jaroj 1918–1945	8
Bonvenon al Oomoto	15
Jarní 2026	21
Tys nešla	22

O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brachacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

AKTUALAĴOJ

Okazintaĵoj

16/12/2025 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

18/12/2025 – Kristnaska vespero (*klubejo*)

29/01/2026 – diskuto pri la praga Esperanto-monumento (*klubejo*)

21/02/2026 – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno (*la praga ZOO*)

26/02/2026 – prezentado de Vlasta Stará pri la temo „Patchwork – mia hobbio“ (*klubejo*) – registraĵo trovebla [en nia jutuba kanalo](#)

12/03/2026 – prelego de Pavla Dvořáková pri la Esperanto-literaturo en la 21-a jarcento (*klubejo*)

21/03/2026 – E-mentala aranĝo Ludu kun ni 1 en Pardubice

26/03/2026 – diskuto kun Viktor Dvořák okaze de lia 90-a naskiĝtago (*klubejo*) – registraĵo trovebla [en nia jutuba kanalo](#)

09/04/2026 – prelego de Bohumil Bouzek nomita „Kiel fari grandajn saltojn kun malplenaj poŝoj“ (*klubejo*) – registraĵo trovebla [en nia jutuba k.](#)

11/04/2026 – E-mentala aranĝo Ludu kun ni 2 en Šumperk

Venontaj aranĝoj

23/04/2026 – kvina prelego de Pavla Dvořáková de la serio „Surspure de doktoro Zamenhof“ (*klubejo*)

07/05/2026 – prelego de Josef Kalčík pri la temo „Moderna propagando, informa militado kaj protektado kontraŭ ĝi“ (*klubejo*)

04/06/2026 – prelego de Petr Chrdle pri Vlastimil Novobilský kaj Jiří Kořínek (*klubejo*)

06/06/2026 – E-mentala aranĝo Ludu kun ni 3 en Brno

Reta Babilado

Kaŝde úterý během školního roku od 17 hod. probíhá internetové konverzační fórum Reta Babilado, a to na adrese <https://meet.jit.si/ces-reta-babilado>. Podrobnosti najdete na www.esperanto.cz.

Viktor Dvořák 90-jaraĝa



La 25-an de marto 2026 la doĵeno de nia klubo, samideano Viktor Dvořák, festis sian respektindan 90-an naskiĝtagon. Ni tre ĝojis, kiam Viktor konsentis, ke dum la kunveno tuj post lia naskiĝtago (la 26-an de marto) ni organizu por li feston kaj diskuton. Dum la diskuto ni demandis Viktor-on pri liaj rememoroj kaj spertoj, interalie pri tiuj, kiuj rilatas al lia abunda kaj

senlaca agado por Esperanto kaj al lia ŝatata poeto Otokar Březina. Ni deziras al Viktor firman sanon kaj multe da feliĉo kaj energio.

Mallongigita versio de la registraĵo de la diskuto estas disponebla [en nia jutuba kanalo](#).





Pelhřimovská Agentura Dobrý den zastřešuje v České republice oblast rekordů a kuriozit. V roce 2019 zapsala rekord Viktora Dvořáka, a to s následujícím vysvětlením:

Nejvíc překladů básně českého autora

16 překladů básně Moje matka

Ing. Viktor Dvořák, CSc., z Moravských Budějovic je editorem elektronické knihy „Otokar Březina: Moje matka – My Mother – Mia Patrino“, v níž se mu podařilo po několikaletém úsilí uspořádat kolekci šestnácti překladů básně Moje matka, která je projevem úcty básníka k této ženě. Báseň, jež byla v rekordním počtu přebásněna anglicky, německy, bulharsky, chorvatsky, francouzsky, italsky, latinsky, lotyšsky, maďarsky, polsky, rumunsky, rusky, slovensky, srbsky, španělsky a esperantsky, je v elektronické sbírce zveřejněna i v původním básníkově podání (česky), včetně několika pozdějších variant. Publikace je rovněž doplněna úvodem, ediční poznámkou a na obálce upoutávkami v češtině, angličtině a v esperantu.

Tento počin byl u příležitosti vernisáže výstavy „Otokar Březina – překlady básní aneb Domluvíme se v EU?“, která se konala v předsálosti Jednacího sálu Senátu Parlamentu České republiky 11. června 2019, zapsán do České databanky rekordů Agentury Dobrý den, která spravuje Muzeum rekordů a kuriozit Pelhřimov.

<https://www.dobryden.cz>

La vivpriskribon de Viktor Dvořák en Vikipedio vi trovos ĉi tie:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Viktor_Dvo%C5%99%C3%A1k

VD 90

Petr Chrdle 80-jaraĝa



La 12-an de marto 2026 nia kara samideano Petr Chrdle fariĝis 80-jara.

Hazarde ĉi tiu lia granda datreveno koincidis kun la tago, kiam okazis regula kunveno de la klubo. Danke al tio ni povis festi la naskiĝtagon de Petro kune.

Ni transdonis al li diplomon, ni tostis kaj ni kune manĝis torton. Poste sekvis interesa prelego de Pavla Dvořáková pri la Esperanto-literaturo en la 21-a jarcento.

Ni deziras al Petro multe da sano, feliĉo, bona humoro kaj multe da novaj spertoj kun Esperanto.

Tomáš Břicháček transdonas al Petro dankesprimon

Prelegoj, intervjuoj kaj artikoloj de Petr Chrdle

Okaze de la vivjubileo de Petr Chrdle en la paĝaro Esperanto.cz aperis grandega listo de retligiloj al liaj registritaj prelegoj, intervjuoj, artikoloj kaj aliaj interesaj materialoj.

- Ligiloj al Esperantaj videoprelegoj troveblas en la paĝo: <https://www.esperanto.cz/eo/aktuality/videoprelegoj-de-petro-chrdle.html>.
- Aliaj ligiloj, koncernantaj materialoj en ĉeĥa lingvo, estas en: <https://www.esperanto.cz/cs/aktuality/petr-chrdle-v-ceskych-mediich.html>.

„Petr se připojil k těm nejvýznamnějším esperantistům světa. Nejen svým slovesným dílem, ale veškerou činností – sportovní, turistickou, cestovatelskou. A vše s humorem... Ať mu dlouho vydrží!“

Margit Turková


Solena vespero de KAVA-PECH

Pavla Dvořáková

La 11-an de marto 2026 en la plenplena salonego de la Asocio de Interpretistoj kaj Tradukistoj en Prago en la placo Senovážné okazis solena libro-prezentado de du titoloj el la eldonejo KAVA-PECH de Petro Chrdle. La unua estis tute nova eldonaĵo *La Vojo de la Korpa Saĝo* (ĉeĥlingva, pri la movkoncepto kun Esperanteca nomo Permanento) de Kateřina Macháčová, akompanata de enkonduka prelego kaj ekzemploj de praktikaj ekzercoj. La dua titolo estis la poŝvortaro de Miroslav Malovec (kies Esperanto-ĉeĥa parto entenas ĉirkaŭ 4 000 kapvortojn kaj la ĉeĥa-Esperanta ĉirkaŭ 6 000 kapvortojn) – ĉi tiu estis publikigita jam pli frue, sed ĝis nun atendis sian oficialan lanĉon. La patrono de la vortaro ekestis Tomáš Břicháček, la prezidanto de la Esperantista Klubo en Prago.

La eventon akompanis vend-eksponzio de la eldonejo kun porokazaj rabatoj kaj bongusta refreŝiĝo. Interesitoj pri la publikaĵoj estas invitataj viziti la retejon <https://www.kava-pech.cz>.

Temis pri bonvena okazo por komuna renkontiĝo de geamikoj kaj esperantistoj, kaj praktikantoj de la menciita sistemo de ekzercado. Espereble por ambaŭ grupoj la aranĝo alportis novan inspiron kaj novan ekkonon kaj pro sukceso tiu ĉi koncepto estos realigita denove ankaŭ sekvontfoje.



Po vydání Velkého esperantsko-českého slovníku (2017) a Velkého česko-esperantského slovníku (2022), které jsou určeny zkušeným esperantistům jako jazyková poradna, se objevila potřeba malého kapesního slovníku pro začátečníky, kteří se s jazykem teprve seznamují. Esperantsko-česká část nabízí zhruba 4000 hesel, část česko-esperantská asi 6000 hesel.

Autor:	Miroslav Malovec
Nakladatel:	KAVA-PECH
Rozměr:	120 x 170 x 17
ISBN:	978-80-88326-50-2

Ludu kun ni!

Vlasta Pištíková

Jam la trian fojon E-mental' organizos serion de eventoj en diversaj urboj de Ĉeĥio.


La unua serio okazis en la jaro 2017 kaj ĝi nomiĝis „Tostu kun Zamĉjo“ kaj ĝi estis organizita, ĉar ĝuste en tiu jaro estis „Jaro de Zamenhof“. Krom la tostado oni ankaŭ pendigis grandan Esperanto-flagon sur diversaj turoj, pontoj aŭ aliaj taŭgaj lokoj.

Dua serio okazis en la jaro 2024 kaj ĝi nomiĝis „Ĝuu EsperantoN“, dum kiu krom amuza parto estis ankaŭ programero dediĉita al ekzercado de akuzativo. Parto de la kunveno ĉiam estis turniro en finlandaj kegloj, kiam E-mentalanoj ludis kontraŭ lokaj esperantistoj.

Ĉi-foje la serio nomiĝos „Ludu kun ni!“. Por la evento estas planataj 9 urboj kaj programo similos al la pasintjara serio. Ĉar la „kegla“ turniro estis pasinjare sukcesa kaj ŝatata, ankaŭ ĉi-jare ĝi okazos.

E-mental' esperas, ke la eventon partoprenos multe da lokuloj kaj ke ĉiuj komune povos ĝui agrablan tempon.

Literatura Vivo



Ni atentigas vin pri la nova monata interreta revuo Literatura Vivo, kiu estas tre aktiva kaj interesege.

Ĝi celas montri la riĉecon de la Esperanta literaturo per diversaj ĝenroj kaj voĉoj: poemoj, prozo, kantotekstoj, intervjuoj. Ĉiumonate oni elektas freŝajn kontribuojn por inspiri kaj plilarĝigi la vidkampon de la legantoj.

La fondintino kaj ĉefredaktorino estas Erika Godó, hungara esperantistino, poetino, verkistino, literatura tradukistino kaj kantotekstverkistino. Kun-ĉefredaktoro estas John Huang, ĉindevena kanadano, komercisto kaj fotisto.

<https://www.literaturavivo.com>

Esperanto-Laboro en ĈSR en la jaroj 1918-1945

Vuk Echtner

Enkodigo de Petr Chrdle

Vuk Echtner (1905–1994)

Pri la vivo kaj agado por bahaa kredo, por nevidantoj kaj precipe por Esperanto de tiu nekredeble agema esperantisto mi preparas ĉeĥlingvan biografion en libra formo. Dum la kolektado de fontoj mi renkontis en la regiona arĥivo en Pilseno longan prelegon pri la Esperanto-movado inter la du mondmilitoj.

Malgraŭ tio, ke ekzistas informoj pri V. Echtner kiel relative ofta preleganto en Esperanto, ĉi tiu estas la sola prelego, kiu konserviĝis en skriba formo (aŭ almenaŭ la sola, kiun mi trovis). Li sendis ĝin al la konferenco el malsanulejo en la jaro 1971.

Tial estas preskaŭ certe, ke li kutimis prelegi parkere laŭ preparitaj notoj kaj verkis siajn prelegojn, nur kiam li ne povis mem prelegi. Mi ne miras, ĉar mi faras same.

Mi konsideras la prelegon tre lerniga ankaŭ por nia tempo, tial mi elektis la partojn tuŝantajn Pragon aŭ agadon de pragaj esperantistoj, kaj la rezulton vi trovos ĉi sube.

Se iu interesiĝas pri la kompleta prelego, kontaktu min, kaj mi ĝin al li aŭ ŝi sendos.

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Vi decidis diri mian nomon, kiam vi estis elektintaj la personon, kiu parolu pri la Esperanto-laboro en nia lando el inter du grandaj militoj, ĉar vi scias, ke mi kunfaris tiun laboron kaj ke mi travivis ambaŭ militojn. Mi klopodos tre sincere por provi skizon de la bildo pri tiu epoko, sed antaŭe petas multan vian indulgon por la rezulto de mia provo. Mia tasko ne estas facila. Sed ĝi estas samtempe tre alloga kaj edifa, ĉar ĝi donas okazon paroli pri eble la plej glora epoko en la ĝisnuna historio de la Esperanto-laboro. ...

Granda estis la subita bato (de la 1-a milito). Ŝajnis, ke nur profunda spirado restis al la Esperantistoj fine hejmen venintaj – kaj al la aliaj konsternite gapintaj la furiozantan militmaŝinon. Ŝajnis, ke ĉiu ajn Esperantolaboro estas ĝismorte batita kaj ke Esperanto ĉesos ekzisti.

Sed tamen, la spirito de tiu laboro estis forta kaj vivi ne ĉesis. Eduardo Kühnl en Hispanujo fariĝis konata batalanto por la justa liberigo de sia nacio – kaj uzis por sia revolucia kunlaboro sian Esperantan lingvoscion

kaj la Esperantokontaktojn. Ni scias hodiaŭ, kian bonan rezulton li atingis ĉu por sia lando, ĉu persone. Kiel Esperantisto li fariĝis membro de la diplomata ĥoro kaj membro de la Akademio. – Simile multaj aliaj Esperantistoj agis kaj diligentis, antaŭ ĉio en kunlaboro kun la Universala Esperanto-Asocio, kies sidejo estis tiam en Ĝenevo, en lando neŭtrala, kiu pro tio povis fari multon pozitivan por – kaj precipe per Esperanto. La naciaj Esperanto-Societoj devis malaperi aŭ almenaŭ silenti, sed la Universala Esperanto-Asocio en Ĝenevo tagnokte laboris por helpi en harmonia kunlaboro kun la internacia Ruĝa Kruco malfeliĉajn viktimojn de la milito, per Esperanto serĉante, trovante kaj kunigante disŝiritajn familiojn kaj aliajn ligojn, provizante per helppaketoj malsatantojn ktp. – En pli trankvilaj landoj la samideanoj firme tenis la standardon en la Esperanto-laboro. Ili venis por kongresi en 1915 al San Francisko, Usono. Ili ne estis multaj kaj la plej rimarkinda kongresrezolucio el tiam estis decido, ke la venontan Universalan Kongreson oni organizu nur post militfino.

Sed ankaŭ en nia lando la samideanoj ne ripozis dum la unua mondmilito. Ankaŭ ili, simile al UEA, trovis vojon, forton kaj rimedojn por fari servojn, en tiu malfeliĉa kaj danĝera tempo maksimume pozitivajn, kaj supere humanajn. Baldaŭ en la unuaj militjaroj venis el la batalkampo la unuaj viktimoj, la militblinduloj. Iliaj unuaj helpantoj estis la Esperantistoj! Nuntempe estas kortuŝe legi, kian grandan, malfacilan batalon ili kapablis venke gvidi por savi malesperulojn sen vivhorizonto, por filtri en ilian spiriton subite, kruele mallumigitan, novan esperon kaj vivkuraĝon. Apenaŭ kredeblas, ke samideanoj Karel Emanuel Macan kaj Profesoro Stanislav Stejskal, helpataj de Václav Riegel (kies nomoj estas ofte legataj en la antaŭmilitaj gazetoj), sukcesis prezenti Esperanton kiel unu el la epikaj rimedoj de spirita rehabilitacio – kaj ili sukcesis plene, tiel ke tiu ĉi laboro kaj ĝiaj pozitivaj rezultoj grave kaj decide influis la postan evoluon en la movado, kiel mi ankoraŭ montros. ...

En Hago, Nederlando, 1920 kolektiĝis laŭ la Sanfranciska rezolucio nemultnombra aro en la unua postmilita Universala Kongreso de Esperanto, la 12-a, kiu ree rezoluciis, laŭte vokante: „Vivu la 13-a Universala Esperanto-Kongreso 1921 en Prago! Ĝis revido en la nova lando, la Ĉeĥoslovaka Respubliko!!“

Oni demandas sin, kiel nur povis la ĉeĥoslovaka samideanaro kuraĝi inviton de granda, tutmonda, universala kongreso al sia ĉefurbo troviĝanta ankoraŭ en la zorgoj kaj tumulto de la revolucia, novŝtata stariĝo?

La respondo estas simpla, kaj tamen tre surpriza kaj impona por spektanto el tempo nuna, de sur la pozicioj de perspektivo de 50-jara historio.

Krom la menciita Esperantista humana agado inter militviktimoj funkciis ankaŭ fako teoria. Meze de la unua mondmilito eĉ aperis lernolibro. La

instruantoj de militblinduloj uzis ĝin. En la jaro 1917 Julie Šupichová sukcesis eldoni lernolibron!!!

Foliumante la Kronikon el tiuj jaroj, oni ricevas la impreson fortan kaj emocian, ke Julie Šupichová en tiu danĝera tempo estis preskaŭ la sola generalo, en niaj landoj, sur la fronto de interkompreniĝo, amikeco kaj paco. Viroj staris sur la batalkampo, kuraĝa virino gvidis la fronton de la Paco. En la kronikoj mankas unu forte impresa epizodo. Kiu el la malnovaj samideanoj, krom mi, rememoras ŝian rapidan, tre kuraĝan kaj riskan cirkuler-leteron, en kiu ŝi insiste alvokis ĉiujn atingeblajn aktivulojn Esperantistajn, senprokraste neniigi ĉiujn Esperanto-korespondaĵojn, en kies frunto staras la vortoj Kara Samideano aŭ nur Samideano kaj simile? La kialo estis, ke la militpolico ricevis anoniman akuzon kontraŭ danĝeraj homoj, organizitaj en sekreta grupo, kies gvidanto kaŝas sin sub pseŭdonimo „Kara Samideano“, kaj dissendas al siaj adeptoj kontraŭŝtatajn tekstojn en sekreta lingvo. – La simplaj senkulpaj kaj ofte naivaj Esperanto-leteroj, superskribitaj per la vortoj „Kara Samideano“ estis preteksto, tre verŝajne el la kampo idista devenanta, por detruigi la laboron de Julie Šupichová kaj de aliaj Esperanto-aktivuloj.

Resume, mi vidas sufiĉe interesan laboragadon poresperantan ankaŭ en niaj landoj, dum la unua mondmilito. Kaj tial la Kongreso en Hago, kun siaj nur 1100 partoprenantoj, povis akcepti la inviton de ĉeĥaj reprezentantoj, de Augustin Pitlík, ministeria oficisto, kaj de la ĉeĥoslovaka ambasadoro en Hago, s-ro Maxa, inviton aranĝi la Universalan Kongreson 1921 en Prago.

Por la disvolviĝinta febra labortumulto de ĉeĥaj kaj alinaciaj samideanoj estis jam de antaŭe pretaj diversaj helpiloj. Ili konsistis, krom la jam menciita milita eldonaĵo de Julie Šupichová, el jenaj verkaĵoj:

1919 aperis verketo de Prof. Stanislav Kamarýt. Ĝin eldonis, en sia populara kleriga serio *Za vzděláním* la eldonisto J. R. Vilímek en Prago. – Tiu ĉi eldonejo staras en nia historio sur laŭdinda posteno. En ĝi aperadis infangazeto *Malý čtenář*, sur kies kovrilo, do okulfrapa paĝo ni povas trovi kurson de Esperanto el la plumo de Julie Šupichová. La kurso ampleksas en ĉiu numero la tutan paĝon. Jam en antaŭaj, antaŭmilitaj jaroj vi povis trovi ĝin tie, kaj en 1918, komence de nova lernjaro reaperas la unuaj lecionoj de nova kurso, ... Laŭ la kurso en *Malý čtenář* ankaŭ mi en 1918 eklernis Esperanton en malproksima apudlima regiono de Ĥodujo, kaj post veno al Prago fariĝis por ĉiam fidela disĉiplo de nia plej sukcesa Esperanto-pionirino kaj de ŝiaj labormetodoj.

1919 eldonis Julie Šupichová aŭ pli bone Rondeto de Esperantistinoj broŝureton *Učte se esperantu!* – Samjare la Esperantistoj revenis al eldonado de informaj flugfolioj, eldonataj jam antaŭ la unua mondmilito,

kaj prof. Kamaryt eldonis presaĵon *Co jest esperanto*, Bouška eldonis informilon *Rozšíření esperanta kaj Esperanto mezi Čechy*. Aliaj aŭtoroj – kaj inter ili ree Kamaryt – estis tre diligentaj en la eldonado de diversa inform-materialo.

La plej multnombra Esperanto-klubo en Prago disvolvis ampleksan aktivecon ne nur en la teritorio de la ĉefurbo, sed ankaŭ en multaj aliaj regionoj. Nomoj de la klubaj aktivuloj aperas tre ofte en raportoj pri prelegoj kaj kursoj en multaj, grandaj kaj malgrandaj lokoj, en kelkaj kazoj eĉ sufiĉe malproksimaj de la ĉefurbo. ...

La plej ofte ripetigantaj nomoj de Esperanto-aktivuloj el tiu postmilita periodo estas Kamaryt, Šupichová, Hromada, Pitlík, Friedrich, Keyzlarová, Sklenčka, Ing. Berger, Pech, Ginz, Lukáš, D-ro Fousek, Janalíková, Ing. Kroužil.

El tiuj ĉi nomoj de lokoj kaj personoj vi povas konkludi, ke la Esperanto-laboro radikiĝis en multaj lokoj provincaj, en Moravio kaj Slovakujo...

En 1920 ankaŭ la germanaj samideanoj de nia respubliko ekaktivis. Ili fondis por sia propaganda laboro propran centran Esperanto-organizaĵon, la Germanan Esperanto-Ligon en la Ĉeĥoslovaka Respubliko, kaj transprenis – renovigis la monatan revuon *Marto*, kiu antaŭe aperadis en la aŭstria urbo Graz. – Pri la Germana Ligo mi volas diri, ke ĝia kunlaboro kun ĈAE estis bona kaj harmonia ĝenerale, sed baldaŭ montriĝis kreskanta misuzo eĉ de tiu ĉi organizaĵo por nacia iredenta celado, kiu – fine – estis rifuzita eĉ de la hok-krucanoj.

GEL organizis la germanajn Esperantistojn en ĈSR, ĈAE la ĉeĥajn, slovakajn, rutenajn kaj anojn de aliaj minoritatoj.

GEL do havis presorganon por sia laboro.

ĈAE ne havis.

1920, septembre, aperis la unua numero de *Esperantský zpravodaj*, multsignifa monata gazeto en ĉeĥa lingvo pri-Esperantista. Ĝi estis organo de neniua organizaĵo. Redaktis kaj eldonis ĝin Julie Šupichová, dum tri jaroj. Ĝia enhavo estas tre utila ankoraŭ nuntempe, kaj kiu posedas la volumon de la tri jarkolektoj, tiu gratulu sin mem. *Esperantský zpravodaj* fariĝis kvazaŭ organo de la 13-a Kongreso. En ĝia dua numero aperis la unua informaro pri ĝi, kun la nomaro de la Loka Kongresa Komitato. Prezidanto de LKK estis la prezidanto de ĈAE kaj prezidanto de la Esp.-Klubo en Prago, direktoro de gimnazio, prof. Eiselt; estis du vicprezidantoj, urba oficisto Kraus kaj Julie Šupichová, ĉefsekretario estis Pitlík, komisaro de ministerio; ĉefkasisto estis bankoficisto Rudolf Hromada. Nunjare pasos 50 jaroj de la kongreso – estus tre interese rememori tiun memorindan kaj en la landa kaj tutmonda multsignifan eventon. Tion malfacile povus permesi la amplekso de tiu ĉi prelego. ...

Ŝajnas al mi, ke mi ne sufiĉe substrekis la viglan agadon de multaj organizaĵoj, ilian meriton, ekz. de la Rondeto de Esperantistinoj (kio estis la nove reorganizita „Fraŭlina Rondeto“) kaj kelkaj aliaj en Prago kaj ekster la metropoloj... En 1920, en la 12-a Esperanto-Kongreso, faris Ĉeĥoslovakion tre alloga kongreslando tiu ĉi ampleksa kaj mondkonata faktaro. Kune kun la elokventa tre bone redaktita, kun multaj lumbildoj akompanata propaganda parolado de Augustin Pitlik, ĝi preskaŭ fascinis la kongresantojn de Hago. Tiamaniere la Esperantista popolo, kune kun sia gvidantaro, facile kaj fervore aplaudis kaj akceptis la inviton al Prago por 1921. Kaj tial la 13-a Esperanto-Kongreso, antaŭ 50 jaroj, fariĝis vere la unua plenpulsita, venka Esperanto-Kongreso postmilita, kun la impona nombro de pli ol 2600 aliĝintoj kaj kun granda signifo por la enlanda kaj, ne malpli, por la tutmonda movado. Ĝi larĝe malfermis la vojon al potenca disvolvo en ambaŭ sferoj. En Prago 1921, dum la Universala Esp.-Kongreso fondiĝis la Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj la Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj...

Ŝtataj ekzamen-komisaroj por Esperanto-ekzamenoj estis nomitaj komence de 1921.

La unuajn ŝtatajn ekzamenojn pri Esperanto oni organizis la 18-an de aprilo 1921 – do, antaŭ la kongreso, ĉe la Ekzamen-Komisiono por germanoj. La germanaj samideanoj ankaŭ tiu ĉi-rilate estis pli viglaj ol la ĉeĥaj.

La ĉeĥaj samideanoj organizis tiajn ekzamenojn por ĉeĥaj instruontoj nur la okan de novembro tiujare, post la kongreso.

Samtempe kun la Ŝtata, oficiala komisiono funkciis de jam pli frue, la neoficiala komisiono de ĈAE. La Ŝtataj Komisionoj estis en Prago kaj Brno. – Aperis ministeriaj dekretoj pri instru-ebleco. Unu parolas pri nedeviga objekto instruada en mezlernejoj, alia konstatas, ke Esperanto estas elektebla lingvo en la instruplano de t.n. Komercaj Akademioj. La eblecon instrui eluzis multaj pluaj lernejoj de diversaj gradoj. – Por tiu celo la ministerio aprobis per dekreto (n-ro 90457 de dato 30 de novembro 1921) la duan eldonon de la lernolibro de Ŝupichová...

Esperanton akceptis por propagandaj informaj kaj administraj celoj la Internaciaj Foiroj en Prago kaj Liberec.

Post la cirkulero de la fervojdirekcio Olomouc favore al Esperanto, sekvis tiu de Bratislava kaj poste la ĉeĥoslovakaj fervojoj ĝenerale.

En 1921 jam trian jaron aperadis la pilzenja *La Progreso*, al tiu gazeto aliĝis nova, fondita de Adámek, kun la titolo *Ĉeĥoslovaka gazeto ...* – Tiam aperadis, krom gazeto *Marto* ankaŭ speciala gazeto por blindaj Esperantistoj kaj la jam menciita *Esperantský zpravodaj*. – Mi notus, ke el ĉiuj ĉi periodaĵoj transvivis ĝis hodiaŭ sole la blindula. Ĝia nomo estas *Aŭroro*.

Tiu ĉi tre varia, multflanka labor-fervoro disvolviĝis ne tre harmonie kaj ne tute glate. Vi facile komprenas, grandaj faroj kaj sukcesoj ofte kreas ĵaluzon kaj rivalecon. Rivaleco ree spronas al faroj ankoraŭ pli grandaj. Persona ambicio kaj prestiĝo forte influas rezultojn. Do, ne estas facile distingi, ĉu ĵaluzo, rivaleco, persona ambicio kaj prestiĝo estas bonaj aŭ malbonaj stimuloj. En la jarkunvenoj ni ofte rigardis la interfrotadon de personaj sentoj kaj vidpunktoj inter la plej diligentaj, plej oferemaj aktivuloj. La junularo malpacienis pri tio – kaj fine – vi povas legi humorplenan artikolon pri tiaj situacioj en La Progreso; la artikolon verkis Jaroslav Šustr, la rajtigita parolanto de la Junularo. – Pli seriozajn trajtojn tiurilate kaŝas la ekŝiĝo de Rudolf Hromada kaj Hynek Květoň Bouška el la LKK de la 13-a, la rezida estro de la kongres-komitato restis Augustin Pitlík...

La samideanoj de Prago invitis al Esperanta Teatro, en kiu ludis diversnaciaj amatoroj.

Ses Orientbohemiaj Laborkonferencoj okazis en la periodo antaŭ la Kongreso.

Granda prelegvojaĝo de Pitlík efektiviĝis en najbara eksterlando, helpata per la subteno de la ministerio por eksterlando kaj aliaj gravaj institucioj. Per tia timigita elokventeco – vi devas scii, ke Pitlík parolis sufiĉe raŭke (eble iom simile kiel Armstrong) – li vekis en la mondo grandan entuziasmon por la 13a kaj por la nova Ĉeĥoslovakio. Kaj estis precipe kaj antaŭ ĉio por ĝi, por la liberigita patrujo, kial la s-anoj tiam tiom fervore laboris per Esperanto en la tuta mondo – kaj tio do transfariĝis nia tradicia tasko kaj estas nia daŭra devo...

Persona sperto, personaj impresoj komprenigas pli bone la simplajn, sekajn faktojn. Nun devus sekvi la temo pri ili, ekz. pri:

- la evoluo al organizita Esperanto-movado internacia, kion reliefigas la Kontrakto de Helsinki; en ĝi gravan rolon ludis la spertoj el la 13a;
- la penetro en fakojn turisma, komerca, scienca, kiun forte direktis la kapablo de ĉeĥoslovakaj samideanoj el la 13a;
- la nova brila ekzemplo por tia praktika uzado de la lingvo; tiun ekzemplon donis la fama Konferenco „Paco per Lernejo“ en Prago 1927;
- pri mia aktiva partopreno en la konstruado de Internacia Esperanto-Radiostacio en Svislando;
- pri la laboro de Moraviaj Esperanto-Pioniroj, kiuj tiom sukcese disvastigis en la mondo nian literaturan arton per Esp.-tradukoj, ekz. de Čapek, RUR;
- pri la unuaj radio-disaŭdigoj en Esperanto el Prago, kiujn mi havis la ŝancon partopreni;

- pri la plej sukcesa UEA-Teritorio starigita de Otto Sklenčka en nia lando;
- pri la unuecigaj problemoj kaj klopodoj, inter ĉeĥaj kaj germanaj samlandanoj, por ke estu nur centra organizaĵo;
- pri la unuaj minacaj ombroj de faŝismo, influantaj tre decide la Esperanto-laboron en nia lando;
- pri la fondo kaj funkcio de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto, Bohema Esperanto-Servo, regionaj organizaĵoj kaj konferencoj;
- pri la Honora Komitato de ĈAE konsistanta el la plej eminentaj altranguloj de la publika vivo en Ĉeĥoslovakio.



Kaj multaj aliaj temoj, ekz. la praga periodo de La Progreso, ĝia malapero kaj la apero de nova revuo, de novaj personoj, de novaj sukcesoj, bataloj kaj batoj mortigaj, de furioza mondbrulego, kiu minacis detru la lastan Esp.-fajron, sed el kies cindro ree, glorie leviĝis kiel la fabela fajro-birdo, nova volo, nova Esperanto-laboro kaj novaj sukcesoj, pri kiuj aŭskultu aliajn, pli interesajn, pli elokventajn prelegantojn. Tre kore salutas ĉiujn konferencanojn, multajn pluajn jubileojn al EK Brno deziras

Vuk Echtner,
hospitalo en Domažlice,
la 7-an de junio 1971

Bonvenon al Oomoto

Margit Turková

OOMOTO – kia mistera vorto...

Ni demandis, ĝis ni eksciis, ke oomotanoj estas ankaŭ esperantistoj, ĉar ili partoprenadis en ĉiuj (?) universalaj kongresoj... Ni troviĝu en la tempo, kiam ni pli profunde konatiĝis kun tiu-ĉi fenomeno.

Estis la jaro 2007 – la UK estis preparata en Jokohamo (Japanio). La vojaĝagentejo KAVA-PECH organizis internacian karavanon: ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, germanoj, italoj (-inoj), La programo estis: unu semajno en KYOTO, unu semajno en JOKOHAMO. Inkluzive grimpon al la monto FUĴISAN – la faman FUĴI-MONTOn. Pri mi persone: mi ne estis diligenta en preparo por la vojaĝo, kvankam miaj amikoj estis tre helpemaj. Josef Trojan (estro de nia EK Prago) enmanigis al mi la japanan gramatikon el sia „vojaĝarkivo“ (ĝis hodiaŭ mi ĝin ne malfermis). Ĉestmír Vidman, poeto, kiu multfoje estadis deĵorcele en Japanio (sed komunikis tie anglalingve) kun ĝoja ekscito rememoris sian restadon en la lando, kaj lia poezio-preta cerbo tuj eklaboris, kaj eldonis jenan rezulton:

1. Li estis ŝercemulo; mi prezentas lian elpenson por iom amuzi mian legantaron... (Rim.: Ĉ.V. ne regis Esperanton, tial bonvolu akcepti la ĉeĥlingvan originalon):

Japonské sako

Horní část pánského oděvu se označuje jako kabát neboli sako.

I v Japonsku se krejčí dělí

na ty, co šijí kalhoty a na ty, co dělají kabáty.

V japonštině: šiju-nohavice a šiju-sako

Pak už je tu jen to společné jméno

pro vše, co je krejčími vytvořeno.

Kdysi krejčík vezl panstvu saka.

Nebyla to práce ledajaká,

každý na ně s obdivem se dívá.

Přepadla ho banda loupeživá.

Krejčík volá lítostivě: „ó, ó, saka“ ...

A tak vzniklo město ÓSAKA.

Nejlepší jsou saka z Ósaky.

Jsou to hotové zázraky.

Šiju-sako saka užije.

Ať si jich každý dobře užije.

2. Mi kredas, ke la legantoj prenas jenan ŝercon kun bona volo. Ĉar nun mi volas prezenti la poeton Ĉestmír Vidman en „elegia poemo“, per kiu li mem esprimis nostalgion por la vidita kaj mian scivolemon por la vidota: por la grandioza miraklo – la Monto. kaj mi samtempe volas prezenti la tradukiston – Jaroslav Krolupper. Dank’ al li ni povas ĝui la poemon en Esperanto.

Fudži

*U moře mohutně se vypíná
Posvátná hora hor
Pod ní rýžová krajina
Až po obzor*

*Snem každého je vystoupit
Až na vrchol A kraj pozdravit
Pri ranním rozednění
Což lehký úkol není*

*Den a noc se stoupat musí
Ale nikdo nehartusí
Pozvolna se vleče tenhle pochod husí
Jen ať to někdo zvládnout zkusí*

*Zvlášť pro našince jde to ztěžka
(dvakrát by se sem vešla česká Sněžka)
Takže předem neustále
Trénovaat se musí vytrvale*

*Také dechem cvičit houževnatost
Překonávat lidskou slabost
Stoupat rozvázně ale neúnavně
Až konečně slunce objeví se slavně*

*Překonat únavu a lenost
Všední a šedou každodennost
Naprout své síly
(i když snad ochabují chvíli)*

*A být včas v cíli
Paprsky světla už se probudily
Nad japonskými ostrovy jako jejich máma
Tyčí se hora Fudžijama*

(1. 4. 2007)

Fuĵi-monto

*Ĉe maro nin surprizas
Masiva sankta monto
Sub ĝi pejzaĵo riza
Ĝis horizonto*

*Supreniri ĉiuj revas
Poste ili supre salute manon levas
Al la lando de aŭroro
Nepras tie ĉi fervoro*

*Tagon nokton oni devas iri
Sen ĝemplori sen suspiri
Pri la lanta marŝo ansero povas miri
Estas malfacile monton tuj akiri*

*Tiu tasko por ni estas ambicia
(nur duona estas Neĝmont' bohemia)
Do ekstaras postulo insista
Pri antaŭa trejnado persista*

*Spiro trejni volon plifortigi
De malforto sin senigi
Supreniri pace kaj senlace
Ĝis la suno tuj aperos grace*

*Laciĝon pigrecon superi
pro ordinareco ne suferi
Streĉi siajn fortojn
Malfortiĝintajn de komforto*

*Por al celo alporti raportojn
Elsaltis sunradioj jam kiel risorto
Patrineca por ĉiuj japanoj
Elstariĝas la Fuĵi-vulkano*

(La poemon esperantigis Jaroslav Krolupper)

El multaj emocioj, kiujn elvokis en ni Fuĵi, estu dirita nur: kvankam la Monto montriĝas akre pinta – ĝi havas vastan kavernon kiel ĉiuj neaktivaj vulkanoj...

Ni estu ĉe OOMOTO

Ni estis gastoj de oomotanoj ĝuste pro tio, ke ligas nin la Lingvo.

Sed Esperanto estas nur ilo por kompreno de postuloj kaj celoj, kiujn ni klarigu sub la titolo **Kio estas OOMOTO**.



OOMOTO estas movado de religia-spirita-societa karaktero. Ĝi disvolviĝis poste kiam la profetino NAO DEGUĈI (vidu la bildon maldekstre) en la jaro 1892 ricevis de la SPIRITO unuajn komunikojn. Disĉiplo de Ŝi estis edzo de Ŝia filino, sed poste la spiritan gvidadon transprenis nur virinoj en la familio. Ĉi-tempe estas la kvina. La movado havas siajn filiojn tra la mondo. Krom aliaj estas uzata ankaŭ Esperanto por disvastigi noblajn spiritajn ideojn, kiuj sonas jene (citaĵo):

La vorto OOMOTO mem signifas „La Granda Fonto“. Kvankam en Japanio radikiĝis ŝintoizmo, la religio mult-diisma (el 6-9 jrc.),

OOMOTO-movado instruas, ke ĉiuj dioj eliras el unu Fonto (DIO), kiu trapenetas la tutan kosmon. La celo de la homo (homaro) estas unuiĝi kun la Dio (en la), ke estu sur la tero estigita Lia regno.

OOMOTO aktivas interreligie kaj klopodas antaŭenigi interreligian kunlaboron.

Itinero de nia vizito ĉe OOMOTO

La movado havas du centrojn:

AJABE. En kiu la medio-profetino ricevis la unuajn komunikojn.

La loko estas spirit-eduka centro de la movado.

KAMEOKA. Organizo-administra centro.

Unue ni veturis (el KYOTO) al AJABE, kie estis preparita digna/ grava programo:

1. La ĉeesto ĉe la religia rito en la sanktejo ĈOOSEI-den
2. Komunika fotado antaŭ la Sanktejo
3. Tagmanĝo en la Centro de OOMOTO
4. Partopreno de prelego pri OOMOTO

Ad 1) Unu reprezentanto de ĉiu nacio (el nia grupo, kiun elektis Petro Chrdle) ricevis pinio-branĉeton (simbolo de pureco), kiun lokis sur la altaron. Ni estis instigitaj aktive kunesti la ceremonion; tial ni ricevis la tekston de la Preĝo, kiun preĝis la pastro. La Preĝo nomiĝas **AMACU-NORITO** kaj ĝia senco estas jena(citaĵo):

Ĉi tiun grandan universon la absoluta Vera Dio (Kreinto) eterne saturas per Sia virto. Li regas ĉiujn diojn por gardi la universon. Nur tiuj,

La aktiveco de Liaj spirito (Kamuroge) kaj korpo (Kamuromi) ĝis kie manifestiĝis kiel Dio Izanagi (Kam-Izanagi-no-mikoto) kaj ĉi tiu Dio senĉese agadas por la purigado de la universa naturo. Do, la dioj de Haraido, kiuj, laŭ Dia volo, dividas inter si la metabolajn funkciojn de la universo, bonvolu elpurigi ĉiujn kontraŭ-diajn aferojn: pekojn, makulojn ktp. kaj ankaŭ ĉiuj dioj ĉielaj kaj teraj bonvolu kune kabori, ni petas.“ Jen, kiel klarigite, la esenco de ĉi tiuj preĝvortoj konsistas en la peto al la ĉielaj kaj teraj dioj, ke ili elmontru la di-virton por purigado...

Kiam ni kaptis la finajn vortojn de la preĝanto:

Oomoto Sume-Oomikami – ni postripetis: „mamori tamae sakihae tamae“ (dufoje)

Kannagara Mamiĉi-ijahiro – ni postripetis „Ooicuki-kuninaohinuŝi-no-Mikoto /mamori tamae sakihae tamae“ (dufoje)

Kannagara – ni postripetis: „Tamaĉihae mase“ (dufoje)

Ad 2) Ni fotiĝis. Ni estis 24 esperantistoj diversnaciaj. kaj ni havis la ĉiĉeronon TATSUOn, kiu de la komenco, el Jokohamo, afable prizorgis nin. Li jam ne estas inter ni, sed en la ĉielo Esperanta. La danko al li estu esprimita almenaŭ en jena artikolo!

Ad 3) Poste ni tagmanĝis... La menuo estis specife japana: fiŝfileto – kaj algoj (almenaŭ en la supo)...

Ad 4) En la prelegejo oni sidas sur planko... (La posttagmezan dormeton ĝuis nur tiuj, kiuj sin apogis al la muro).

Poste ni travojaĝis al la menciita dua loko de OOMOTO – al KAMEOKA. Kiel jam dirite, tie troviĝas eduka centro – do oficejoj, lernejoj kaj prelegejoj. La loko estas ligita kun la dua fama nomo – la estro Onisaburo Deguĉi, estas tie dokumentita malfavora historio de la movado (simila al la Esperanta!). Ankaŭ ĉi tie staras nobla sanktejo. Oni omaĝis „la tagon de purigado“, do alvenadis la disĉiploj. Siajn preĝojn ili subtenis per reciproka gastigado – do ni, liaj gastoj, estis ankaŭ regalitaj per riza vino kaj buletoj. Sur teraso de la sanktejo „elpeladis demonojn“ la grupo per sia tambura „muziko“.

Per kora dankesprimo al japanaj esperantistoj rememoras M.T.



El la arhivo de Margit Turková



LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Jarní 2026


Věra Ludíková

Větrík hraje na pikolu,
o jaru cos ševelí,
že málo jen se čápi zpozdí,
žáby ať se tetelí.

Flétny teď už ozvučily
vzdechy fialek,
s ptačím trylkem splývá v jedno
celá jarní zem.

Vítr fučí na fujaru,
až vše přehluší,
nikomu tím nepomůže,
správně vytuší.

Zázrak se stal a náš Pán ožil,
láska a pravda je vítězná.



kresba Zora Ludíková

Tys nešla

Otokar Březina

Příliš brzy jsem rozsvítil lampy a do váz natrhal kvítí
a vůněmi, jež v plamenech šlehají krví, své síně jsem nadech':
koberce prostřel jsem, naléval vína, v nichž slunce minulá svítí,
jež před lety usínala v chudých mých vinohradech.

Tys nešla. Hodiny z dálky se smály, má jara v nich jasmíny kvetla,
a dýchala na tvůj neznámý obraz věnčený lilijemi;
čas vadl, růže mé chřadly, vína má hořkla, rudla má světla,
a sny, jež jsem ti naproti vyslal, se vrátily teskny a němý.

Tys nešla. Zaklínal jsem tě magií Vůle, jež prostorem sálá
proudy tajemných spojení a přenáší nejhlubší chvění!
Větrům jsem házel setbu své touhy, aby v duši ti splála
v ohnivě keře a sugescí vůně vedla tvé snění.


S dušemi básníků jsem hovořil o tvé váhavé chůzi;
naděje má s umdleným úsměvem seděla na prahu dveří;
oněmly cesty, bázní se schoulily stromy a v soumraku hrůzy
šlápěje přátelských kroků jak černým sněhem se zaváty šerí.

Tys nešla. Kdo tě potkal a svedl z mých zahrad? Či leká
tě oblak, jenž zhaslými slunci se pozdvih' a nad mým domem se prostřel?
Či smrt, která zabíjí v křižovatkách mé hosty a čeká,
až sám se přiblížím k oknu, blízko na osudný dostřel?

Je pozdě již. Záclony zdvihám, okna svá bez bázně otvírám výším
a od hvězd zvoní mi píseň započatá před staletími;
neznámý hlas tvůj chladivým nárazem etheru slyším
z té písne věčné se trásti tony prtlumenými.

V noci všech světů padá, kde polibků jásavá bouře se sráží,
jež rozžehá v křížení blesků nespočetné životy příští.
Věř, my se to líbáme tisíci retů, objetím tisíců paží,
ve věčnosti bolestné něhy, jež od věků do věků prýští!

Ve vášnivém tepotu věčného Srdce, jež tisíci údery buší,
v tušení, jež prochází hroby a svítí z budoucích zori,
v tajemství Zrání, jež v jedné duši slívá tisíce duší
a pohledem letícím věky na tváři zpřízněné hoří.



Stále se mám na co těšit

Jiří Karen

Miluji slova křehká a svěží
Miluji obrazy a knihy
Teď navíc do schránky
mi cinknul dopis
A což teprve
kvetoucí višně
pod okny?

I kdybych žil tisíc let
měl bych se stále
na co těšit
Šedivý život čeká
jen šedivé lidi

Esperanto kaj nacilingvaj kulturoj konkuras samnivele en INK!



Partoprenu ankaŭ vi la sesan eldonon
de la **Interkultura Novelo-Konkurso**

ĝis la 30-a de junio de 2026.

<https://bobelarto.ink/eo/konkurso>

Termíny schůzek do června 2026

23. 4. // 7. 5. / 21. 5. // 4. 6. / 18. 6.

Program sledujte na <https://eventaservo.org/o/EO-Prago>.

Klub esperantistů v Praze,
pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00
Web: <https://eventaservo.org/o/EO-Prago>
E-mail: paha@esperanto.cz
Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>
YouTube: Esperanto Prago
Schůzky: Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00